



**3(157)  
2016**

# Apudvistula Bulteno

**de Krakova Societo ESPERANTO**

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Claude Piron (Belgio)

## La sufero de l' aliaj

Sufero de amiko ol propra pli turmentas.  
La sian oni portas, kaj oni konas ĝin,  
kaj ŝajnas laŭnature, se lacon oni sentas,  
ke oni ĝin elportu, ĉar estas laŭ destin'.

Ĝi estas posedaĵo, kaj oni je ĝi riĉas,  
sed kiam proksimulon bruligas la dolor'  
ne eblas komuniko, kaj oni malfeliĉas,  
ke oni staras stulte kun senefika plor'.

Kaj ĉia simpatio aŭ pruvo de kunsento  
ne povas liberigi de suferula sol',  
ne povas agi brakoj, man' plenas nur per vento,  
dum vortoj ne dolĉigas, kaj senutilas vol'.

Ho! Tiel vidi fraton kun vundo tro intensa,  
kaj scii ke nenio lin gvidos en ĉagren',  
ne povi porti pecon de lia peno densa  
kaj resti sen rimedo volante en malplen'!

Ekvidi en okuloj alvokon de alarmo,  
kaj aŭdi la doloron tremanta en parol',  
proksimi, sed ne povi, el amikeca varmo,  
pli doni ol kompaton, kun vano de konsol'!

Preferas mi suferi inferon da sufero  
ol senti ĝin en frato kaj stari antaŭ mur',  
tra kiu varma lumo de mia am-ofero  
ne povas elradii ĝis lia malsekur'.

*Ambaŭ poemoj ricevis premiojn dum Belartaj  
Konkursoj de UEA*

Wouter Pilger (Nederlando)

## Mia ĉio

1. kara,  
vi jam vidis ĉiujn stelojn  
antaŭ ol eĉ unu sputniko  
enspacigis.  
vi stelpinte  
pikis mian noktan brus ton.  
la kosmo  
estas kava
2. ĉi-nokte en sonĝo  
mi postkuris vin  
sur la ŝtonaj strandoj  
de la sudo.  
vi estis havinda  
kiel juna Delfino.  
sur la ŝtonaj strandoj  
mi postkuris vin  
dum vi kuŝis apude.  
plej apude, mia havinda.
3. ne ĉiuj estas kia mi.  
imagu!  
la vojoj de liliputo  
en brobdingnag  
devas esti strangaj.  
la birdo kiu ekstere  
kantas la sunon  
ne kantas por mi  
laŭ sama tono.
4. kara,  
mi scius tre bone  
kion fari  
se mi ne havus vin,  
mia ĉio.

## Besta itinero aŭ kelkaj vortoj pri arto kaj naturo en Krakovo

(mallongigo de la pli granda materialo, kiu baldaŭ aperos broŝurforme)

Profesiaj ĉiĉeronoj de Pola Turisma Societo (PTTK) prilaboris diversajn itinerojn por turistoj vizitantaj Krakovon: i.a. **Itineron laŭ la Reĝa Vojo, Universitatan Itineron, Itineron de Sanktuloj** (ekz. de Sanktaj Floriano, Johano Paŭlo la Dua, Fratulino Faŭstina), **Itineron de judaj memoraĵoj** (kvartalo Kazimierz).

Okaze de miaj promenadoj kun gastoj scivolemaj pri interesaj lokoj mi malkovris ankoraŭ kelkajn aliajn vizitindajn objektojn ne menciitaj en gvidlibroj. Ĉar mi ŝategas naturon, precipe bestojn, do mi volas montri kelkajn lokojn en la urbocentro aŭ proksime, kie eblas ilin renkonti. Mi tre ŝatas arton, precipe verkojn de skulptistoj kaj pentristoj. Okazis, ke en Krakovo oni povas ekvidi multajn skulptaĵojn de bestoj ofte troveblaj super pordegoj aŭ starantaj surtere. Ili devenas de renesanco aŭ estas ekzemploj de moderna arto. Kun miaj edzino kaj amikoj mi trovis en la urbo ĉirkaŭ cent skulptaĵojn kaj aliajn artaĵojn, kiuj montras bestojn aŭ bestosimilajn mitologiajn kreaĵojn. Ni fotis ilin por havi materialojn al ĉi tema prelego.

Komencinte nian itineron de S-akta Johano-str., sur unu el domoj oni povas vidi **multkoloran pavon** skulptitan en XVII-a jarc. Tre proksime troviĝas Muzeo de Princoj Czartoryski, kie dum multaj jaroj estis prezentita la plej fama bildo de la kolekto, **Damo kun ermeno** pentrita de Leonardo da Vinci. Proksima S-akta Floriano-Pordego prezentas sur flanko de Plantejo reliefon kun griza ŝtona **aglo**. Domo n-ro 42 Sub Blanka Aglo de la j. 1815 havas emblemon kun **aglo** fiksitan sur fasado. Ĉe la Floriańska-str. n-ro 41 funkcias Muzeo al Jan Matejko en iama domo de la pentristo. Sur la tria etaĝo ni povas ekvidi preparitan **ĉevalon** en la vera haŭto, kiun la majstro uzadis ĉe pentraj kaj desegnaj laboroj. Super pordego de la domo n-ro 15 (Domo sub Sciuro) troviĝas skulptaĵo de **sciuro**. Ni direktiĝas al Ĉefplaco, kie proksime al Floriańska-str. videbliĝas ruĝbrika Domo sub Aglo, super kies pordego oni fiksas **aglon kun serpento en la ungegoj**. Ĉe tegmento de la konstruaĵo troviĝas skulptita **fenikso** laŭ projekto de Stanisław Wyspiański. Fenikso estas birdo de egipta mitologio, kiu ĉiuentjare mortas en flamoj kaj renaskiĝas el la propra cindro. Ĝia plumaro estas ora aŭ ruĝkolora, ĉar ĝi estas simbolo de la suna kulto. La najbara Szpitalna-str. sur Domo sub Kankro (n-ro 7) konservis la mezepokan blazonon – grandan **ruĝan kankron**.

Sur muro de preĝejo al Sankta Maria ni rigardas faritan el bronzo skulpt-tabulon de reĝo Johano la Tria Sobieski sur **ĉevalo** laŭ projekto de Pius Weloński. Ĝi estis fiksita okaze de datreveno de viena venko. Inter menciita preĝejo kaj Draphaloj staras monumento al poeto Adam Mickiewicz, apud kiu oni skulptis ekflugantan **aglon**, kiu simbolas liberecon. **Klubejo sub Saŭroj** troviĝanta je orienta parto de Ĉefplaco estas ornamita per ĉi iamaj lacerto-formaj, sufiĉe grandaj bestoj. De tiu loko oni bone vidas mezepokan, imponan konstruaĵon – Draphalojn, en kiu troviĝas kolekto de XIX-jarcenta arto. Multaj artaĵoj prezentas bildojn de bestoj kaj birdoj, precipe ĉevaloj, hundoj, bovoj, cignoj, cikonioj.

Preterpasante Draphalojn ni rimarkas restaĵon de iama urbodomo – altan turon, kiun gardas paro de **leonoj**. Ili devenas de Morstin-palaco en Pławowice. Proksime de la turo funkcias Kelo sub Ŝafoj en Potocki-palaco, kiu nomiĝas Palaco sub Ŝafoj kaj super pordego, sub balkono havas tri kapojn de **ŝafoj**.

De tiu loko ni povas direktiĝi al Grodzka-strato. Sur Placo de ĉiuj sanktuloj, kie kruciĝas stratoj Grodzka kaj Franciszkańska ni ekvidos super eksa apoteko blazonon de **Ora Elefanto** (1940 j.). Sur proksima korto de Wielopolski-palaco, nuna Urbodomo, videbliĝas blazono de la familio – olda ĉevalo (stary koń), super pordega detalo prezentanta **ĉevalon**. Irante plu laŭ strato Grodzka ni rimarkas domon n-ro 32 ornamitan per XVI-jarc., la plej malnova blazono en Krakovo **Podelwie** prezentanta **leonon** kun ora haro. Sur muro de alo videbliĝas interesa, renesanca reliefo

kun **delfenoj**. Domo sub Elefantoj (n-ro 38) posedas belan blazonon de XVII-jarc. – **elefanton** kaj **rinoceron**.

Tra strato Poselska kaj Plantejo ni povas atingi du imponajn universitatajn konstruaĵojn: Collegium Novum kaj Collegium Physicum. Sur fasado de la dua (nomata nun Coll. Witkowskiego) ni vidas du belajn, novgotikajn skulptaĵojn – **strigon tenantan en la ungegojn serpenton** kaj **baziliskon**. Ĉi legenda besto menciita jam en antikvaj skriboj kaj en Biblio en la mezepoka kristana mondo estis simbolo de la malbono kaj satano. Ĝi mortigadis homojn kaj bestojn per vido aŭ (pli rare) per spiro. Mortigi ĝin oni povis nur montrante al ĝi spegulon, do igante ĝian memmortigon. Arto prezentas ĉi monstren diversmaniere, sed ĉiam kunligante elementojn de diversaj bestoj. La plej ofte ĝi similas al drako, vipuro aŭ leono kun triobla vosto aŭ triobla kresto. En mezepokaj polaj legendoj bazilisko estis koko aŭ meleagro kun serpenta aŭ bufa kapo kaj vipura vosto.

Tra Plantejo ni tramarŝas al Sławkowska-strato, kie ni povas admiri antaŭmilitan Domon sub Evangeliistoj (n-ro 24a). Ĝi posedas sur la nigra muro skulptaĵojn – simbolojn de kvar evangeliistoj. Tri el ili prezentas bestojn kun flugilojn: **leonon** – simbolon de S-kta Marko, **bovon** – simbolon de S-kta Lukaso kaj **aglon** – simbolon de S-kta Johano. Proksime de preĝejo al S-kta Marko ni povas trovi Domon sub Abeloj, kies muro estas dekorita per tri skulptitaj abeloj.

Valoras menci pri aliaj lokoj, iome jam post la centro, kunligitaj kun bestoj. Ĉe strato al Sankta Sebastiano ni povas viziti Naturmuzeon de Akademio de Sciencoj, kie krom vivantaj bestoj, ekz. **reptilioj**, troviĝas unika en la mondo, bone konservita tridek mil jaraĝa **hareca rinocero** kaj du skeletoj – de antikva **mamuto** kaj **kavern-urso**.

En Fandea-Mineja Akademio troviĝas Geologia Muzeo, en kiu staras ŝatata de infanoj kaj studentoj rekonstruita grandega dinosaŭro.

En Plantejo sub Vavelo ni povas admiri skulptaĵojn de **strigoj** lokigitaj sur razeno.

Simile oni starigis skulptaĵojn de **ŝafinoj** antaŭ Agrikultura Universitato ĉe Mickiewicz-aleo.

Inter Vavelo kaj Grunwald-ponto ni ekvidas monumenton de fidela **hundo** Ĝok. Laŭ informo sur monumento, la fidela hundo ĉiutage revenadis tien serĉante sian sinjoron. De tie prenis lin ambulanco pro koratako, bedaŭrinde jam por ĉiam.

Krakovanoj kaj precipe vizitantoj ĉiam memoras pri legenda besto forte kunligita kun monteto Vavelo. Loĝis tie, en la kaverno terura **drako**, kiu volonte formanĝadis virgulinojn. Se ili mankis ĝi kontentigis per ŝafaro. Mortigis ĝin ŝuisto Skuba, kiu regalis ĝin per ŝafino kun sulfuro ene. Post tiu frandaĵo la drako fortrinkis multege da akvo el Vistulo kaj krevis. Drako fariĝis emblemo de Krakovo kaj por rememorigi tiujn okazintaĵojn oni organizas ĉiujare, komence de junio, paradon de drakoj multmaterialaj kaj multkoloraj.

Finante tiun ĉi nekompletan trarigardon mi deziras trairi al bestoj vivantaj. Ĉe Grodzka-str. n-ro 48 ni povas viziti Muzeon de Vivantaj Papilioj, kie eblas rigardi ilin, belajn, multkolorajn el diversaj kontinentoj.

En apudkrakova Wolski-arbaro troviĝas ZOO-ĝardeno kun multegaj reprezentantoj de faŭno. En la urbo mem vivas multaj eksterdomaj bestoj, precipe birdoj, ekz.: kolomboj, paseroj, monadoj, merloj, pigoj kaj ĉe Vistulo cignoj kaj anasoj. Multajn krakovajn droŝkojn tiras ĉevaloj havantaj diversajn felkolorojn kaj riĉajn ornamaĵojn. Ĉiujare, komence de septembro okazas Melhunda Defilado, organizata de Radio Kraków. Akompanata de orkestro ĝi iras tra Floriańska-str. ekde Barbakano al Ĉefplaco. Tio estas unika evento en la tuta mondo, en kiu partoprenas ankaŭ eksterkrakovaj hundoj. Iliaj zorgantoj strebas fari interesan kostumon por sia ŝatato, esperante venki en la speciala konkurso.

Interesan por mi temon mi kontinuas planante aperon de libreto kun fotoj, kiuj povas ilustru objektojn de ĉi tiu trarigardo por kompletigi mian priskribon.

*Adam Wilkus*

## Forpasis Michel Duc Goninaz

Kun la granda tristo mi akceptis informon pri la forpaso de mia amiko kaj amiko de multaj polaj esperantistoj Michel Duc Goninaz.

Multfoje ni renkontiĝadis en Krakovo, Krynica, Poznano kaj Montpeliero okaze de AIS-sesioj kaj franca kongreso. Mi havis plezuron aŭskulti liajn bonegajn lekcionojn pri la esperanta lingvo kaj lingvoj majoritataj kaj minoritataj. La elstaran interesiĝon pri la pola lingvo Michel prezentis dum nia busa vojaĝo de Krynica al Krakovo turmentante min per konstanta atendo komenti signifon de la nomoj de survojaj setlejoj. Precipe mi memoras lian rimarkon pri iu elparolita de mi frazo, kiun li opiniis malĝusta: "Je via lingva nivelo – ne decas, ne decas..." Tio inspiris min detale trastudi ĉiujn eblajn vortarojn kaj gramatikojn kun uzita de mi konstruo de tiu malfeliĉa frazo. Li, bone sentanta literaturon, estis valorega konsilanto ĉe miaj duboj kunligitaj kun miaj tradukaj laboroj. Tiun mankon oni jam ne povos kompletigi.



Michel Joseph Louis Duc Goninaz naskiĝis la 6-an de septembro 1933 j. en Parizo. Li studis en École Normale Supérieure de Saint-Cloud, en Sorbono (1954-59), en la Ŝtata Moskva Universitato (1956-57); akiris licencion pri franca filologio kaj beletristiko kaj agregacion pri la rusa lingvo. Li instruis dum kelkaj jaroj en parizregionaj duagrada lernejoj; ricevis instruoficon de asistanto, poste de docento en la Provenca Universitato (en Aix-Provenca). Tie li instruis la rusan lingvon (1967-96) kaj oficiale agnoskitan Esperanton (1970-96).

Esperanton li eklernis en la gimnazia aĝo (1946) kaj partoprenis en multaj esperantaj aranĝoj en Francio kaj aliloke. Krom la fakaj okupoj li multe laboris por Esperanto instruante ĝin Aix-Provenca, Budapeŝto, Sanfrancisko, Poznano. Li membris en la Akademio de Esperanto kaj en Franca Esperanto-Instituto. De pli leĝeraj liaj hobiaj valoras mencii pri partopreno en esperanta kalendaro "La Tri Koboldoj" (1949-56), aktorado en la unua profesia filmo en Esperanto "Angoroj" kiun reĝisoris Mahe kaj pri kelkaj ne tro seriozaj literaturaĵoj. Li estis aŭtoro de la konstanta kolumno "El la taglibro de nekuracebla optimisto" en La KancerKliniko. Volonte ni aŭdadis tradiciajn francajn kantojn precipe de li ŝatataj, kiujn leĝere kaj ĉarme li plenumadis ĉe la propra akompano piana aŭ akordiona. Multe da ili estis de li esperantigitaj.

Liaj multegaj artikoloj pri konstruo de la lingvo, lingvopolitiko kaj ligo inter lingvo kaj ideo ne perdos la aktualecon. Li kompilis kaj redaktis la gravan kolekton "Studioj pri la internacia lingvo" (1987).

Grandega verko, kiun li feliĉe finis, estis revizio de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2002, 2005). Tiun benediktanan laboron por la novaj eldonoj li faris kune kun Klaŭdo Roux. Mi estas feliĉa posedantino de la ekzemplero el 2002 j. dank' al lia donaco.

Michel Duc Goninaz okupiĝis ankaŭ pri literaturo. Li gajnis la 2-an premion en Belartaj Konkursoj de UEA en 1963 j. kaj tradukis valorajn verkojn de franca kaj rusa literaturoj.

En 2002 Michel Duc Goninaz ricevis la honoran titolon "La Esperantisto de la Jaro".

*Lidia Ligeza*

## Krakova Societo ESPERANTO

### La programo de la renkontiĝoj aprile kaj majo 2016 j.

- 7. 04. 2016 j. – Lidia Ligeza. **Pri dramo de Witkacy „En la eta biendomo”.**
- 14. 04. 2016 j. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj.**
- 21. 04. 2016 j. – Andrzej Feuer. **Pri mankanta en Esperanto vokalo „y“**
- 28. 04. 2016 j. – Alicja Sacha. **Konsiloj el la libro „Vivo feliĉa” de Divaldo Pereira Franco. p.II**
  
- 5. 05. 2016 j. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj.**
- 12. 05. 2016 j. – Lidia Ligeza. **La esperanta vortfarado ankoraŭfoje**
- 19. 05. 2016 j. – **La organiza kunveno antaŭ XXX-aj ETdK**